

- ★ Esperanto en universitatoj / 2
- ★ Zamenhof-Jaro / 4-5
- ★ KEA-Datreveno / 6-7
- ★ La Librofoiro en provincoj / 8
- ★ Kunsidoj de la Komitato (I) / 10
- ★ Oficiala informilo n-ro 2 / 12

Esperanto kaj Zamenhof: Semajno de la pola kulturo en Havano

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Okaze de la Unesko-rekono al Zamenhof, tio estas, la Zamenhof-Jaro, Kuba Esperanto-Asocio starigis tutlandan porokazan programon tiel ke, tra la tuta lando oni organizis lokajn aranĝojn tiucele.

En Havano, la Nacia Estraro de KEA, kiu jam de kelkaj jaroj flegas siajn publikajn rilatojn kun la Pola Ambassadejo, estis invitita aktive partopreni la festadon pro la Semajno de la Pola Kulturo en Kubo.

La 7-an de aprilo okazis en la Nacia Biblioteko José Martí, solenaĵo organizita de la Pola Ambassadejo, kiu arigis grupon de spertuloj el diversaj institucioj, inter kiuj la hebrea komunumo kaj nia Asocio, kun la celo prezenti elstarajn filojn de Pollando. Nome de Kuba Esperanto-Asocio, mi prelegis pri Zamenhof kaj lia heredaĵo al la homaro.

Dum la prezento ni emfazis la genion de Zamenhof, kiu transdonis la taskon evoluigi la lingvon al la parolantoj, kaj ankaŭ fiksas la bazajn normojn aŭ fundamenton por samtempe protekti la esencon kaj garanti la estontecon de la lingvo.

Ni ankaŭ emfazis la gravecon de la rekono de Unesko, iniciatita laŭ propono de Pollando kun subteno de Germanio kaj Slovakio. Per ĝi oni ankaŭ agnoskas la agadon de la esperantistoj laŭlonge de la historia kadre de tiu internacia organizaĵo kaj same de UN.

Kiel sciante, UEA jam de multaj jaroj havas rilatojn kun ambaŭ institucioj.

Ni elstarigis la fakton ke en 2014, pro decido de la Ministro de Kulturo kaj Nacia Heredaĵo, la lingvo Esperanto estis enskribita en la polan Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo.

Aldone, la pola reprezentanto de la ambasado, s-ro Adrian Chrobot, konfirmis la rekonon de la pola parlamento al la vivo kaj heredaĵo de Zamenhof.

Flanke de KEA ankaŭ ĉeestis estrarano pri kulturo kaj faka agado, Juan Ramón Rodríguez kaj Pedro Fernández Rodríguez, estrarano pri financoj; ilin akompanis ankaŭ Ariadna García Gutiérrez, aktivulino de KEA.

La aranĝon partoprenis pli ol 50 personoj el diversaj organizaĵoj kulturaj, de la Nacia Biblioteko, polaj artistoj, ankaŭ diplomatoj kaj membroj de la Kuba Asocio de Unuiĝintaj Nacioj.

Post la prezentoj oni invitis nin spekti artan ekspozicion de polaj aŭtoroj kaj ĝui etan bufedon en la akceptejo de la biblioteko. Dum neformala interparolo kun s-ro Chrobot, nia estrarano Juan Ramón kaj mi alparolis pri kunlaboraj projektoj inter la Pola Ambassadejo kaj KEA.

La ideo rilatas al historia prezento de disertacio de la polo Elias Jonowski en la jaro 1928, en la Popola Universitato José Martí, valora dokumento kiu indas je diskonigo. Principe ni interkonsentis pri estonta formala propono por konkretigi kunlaboron.

Sendube por KEA estis tre positiva reprezentiĝo, kiu ne nur diskonigis la vivon kaj verkon de Zamenhof al tre speciala publiko, sed ankaŭ malfermas pordojn al potencialaj projektoj en fakaj rondoj kaj eksterasociaj institucioj en Kubo.



Decido de Sejmo (Pola Parlamento) omaĝi la memoron de Ludoviko Zamenhof okaze de la 100-a Datreveno de la morto

La 14-an de aprilo 2017 estas la 100-a Datreveno de la morto de Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto.

Ludoviko Zamenhof naskiĝis, kreskis kaj edukiĝis en la medio de multnacia komunumo de Bjalistoko, kiu iĝis por li inspiro por krei internacian lingvon. Li opiniis, ke la homojn dividas antaŭ ĉio lingva baro, kiu kaŭzas konfliktojn kaj miskomprenojn. Li kredis, ke la ideo de Esperanto unuigos ne nur la esperantistojn, sed ke ĝi ekestos la forto unuiganta ĉiujn homojn. La fina versio de Esperanto, konata en la hodiaŭa versio, estis finita de li en 1885. Kune kun la kresko de populareco de la lingvo Esperanto, Ludoviko Zamenhof kiel ĝia kreinto rifuzis ĉiujn rajtojn por ĝi, transdonante Esperanton al la uzo de la tuta homaro. Montrante agnoskon de la kontribuo al ekesto de supernacia lingvo kaj popularigado de ĝi en la mondo, Ludoviko Zamenhof estis en 1905 en Parizo premiita per Ordeno de Honora Legio, kaj en 1913 oni proponis lin kandidato por Nobel-premio. Li mortis la 14-an de aprilo 1917.

<http://espero.bialystok.pl/eo/pola-parlamento-honoris-zamenhofon/>





Supre, Julián Hernández Angulo, estrarano de KEA, prezentas Esperanton al la partoprenintoj en la evento. Malsupre, Vilhelmo Lutermano, prezentas E-eldonadojn de MAS. Fotoj: Maritza Gutiérrez González.

Por pli bona leclono aŭ kiel plibonigi la arton instrui

Kiel plibonigi la arton instrui estas la celo de jara evento kiu okazas en la Supera Pedagogia Instituto Enrique José Varona de Havano, sub la nomo **Por pli bona leclono**. Ĉi-jare la 26-an kaj 27-an de majo sesiiis tiu ĉi scienca evento, kiu konsistigas forumon organizitan de tiu eduka institucio kiu preparas altnivelajn profesiulojn pri pedagogiaj sciencoj en diversaj fakoj.

La Fakultato pri Lingvoj de la Pedagogia Instituto, kie Julián Hernández Angulo, estrarano de KEA pri kapabligo, laboras kiel fakulo pri angla lingvo, ĉiujare invitas geinstruistojn el la tuta lando partopreni la eventon kies celo estas okazigi spertinterŝanĝon cele al plibonigo de la lerninstrua procezo.

Kuba Esperanto-Asocio denove partoprenis per ĉeesto de kelkaj esperantistoj, nome, Pedro Fernández Rodríguez (Peĉjo), Vilhelmo Lutermano, Julián Hernández Angulo kaj Maritza Gutiérrez González, kiuj aŭskultis prelegojn kaj partoprenis laborkunsidojn en vendredo; sekve, en sabato, okazis pliaj kunsidoj, laborkomisionoj, afiŝumado kaj aparte, nome de KEA kaj Monda Asembleo Socia (MAS), kune estis prezentitaj pluraj libroj en Esperanto; oni respondis demandojn pri la lingvo, deklamis kaj kantis per la arto de Peĉjo kaj Julián.

Kiel kolofono de tiu ĉi prezento, KEA kaj MAS transdonis al la dekanino, d-rino Martha Neufville Morris, librodonacon por la universitata biblioteko, kiun ŝi dankis, kaj esprimis la deziron konkretigi kunlaboran projekton inter ambaŭ institucioj, forme de fakultativa kurso.

Flanke de la universitato ankaŭ akompanis nin, d-rino Isora Enrique O'Farrill, prezidantino de la Nacia Komisiono por lingvaj fakoj, plus aliaj profesoroj kaj gestudentoj; kaj d-rino Deisy Fraga Cedré, Rektorino de la Universitato ankaŭ prezentis sian dankesprimon kaj kontenton pro la ĉeesto de KEA en la evento.

Nome de la Asocio, ni dankis la inviton, jam por la kvara fojo dum la lastaj jaroj, kaj esprimis la pretecon plu teni kunlaboron, krom inviti ilin viziti nian Esperanto-Centron por konkretigi estontajn agadojn.

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Esperanto dum scienca evento en Universidad de Oriente, Santiago de Cuba

La 14-an kaj la 15-an de junio 2017, KEA reprezentigis en la 6-a Metiejo Scienc-Metodologia pri Fremdaj Lingvoj, organizita de la Universitato de Oriente (Santiago de Cuba), en la Fakultato pri Edukado, Sociaj Sciencoj kaj Humanismaj Studoj.

Nome de nia Asocio, Gonzalo Collantes García, Ĝenerala Sekretario de la PF de KEA en Santiago de Cuba, kaj prezidanto de la Kuba ILEI-Sekcio, prezentis la prelegon "Lingvaj aspektoj de Esperanto", kiu estis tre interesa por la partoprenintoj, kiuj demandis pri pluraj aspektoj de tiu ĉi lingvo, ne nur ekde lingva vidpunkto, sed ankaŭ pri kulturaj kaj movadaj aferoj en Kubo kaj eksterlande, kio estis multe pli interesa por ni pro la fakto ke Esperanto prezentigis en la Komisiono kiu analizis temojn en rilato kun la angla lingvo.

Ege interesa por la ĉeestantoj estis informo pri la ekzisto de Esperanto en pluraj universitatoj en la mondo, ĉefe en Eŭropo kaj Nordameriko. Kiel sekvo de la prezentado de Esperanto en tiu faka medio, la organizantoj de la Metiejo interesiĝis pri la ebleco organizi kurson de la Internacia Lingvo en tiu fakultato kaj konsideri ĝin libere elekta kaj fakultativa de la lernantaro kaj la instruistaro.

En tiu ĉi lasta direkto, estroj de tiu Fakultato parolis kun Gonzalo kaj Juan Ramón Rodríguez Gómez – estrarano de KEA, kiu ankaŭ



Gonzalo Collantes García, prezidanto de la Kuba ILEI-Sekcio, prezentas la prelegon "Lingvaj aspektoj de Esperanto". Foto: Yoel Hernández Echavarría.

ĉeestis la lastan sesion – kun la celo aranĝi kontrakton kun la Asocio por enkonduki Esperanton en tiu universitato. Ili pripensas eblecojn organizi kurson en tiu universitato por gestudentoj kaj profesoroj kaj planas ekkomenci ĝin en oktobro ĉi-jare.

Dum la metiejo prezentiĝis trideko da prelegoj pri diversaj elementoj en rilato kun instruado de fremdaj lingvoj, ekde teknika, socia kaj kultura vidpunktoj. Ĉeestis ĉ. 40 interesitoj inter profesoroj kaj gestudentoj.

La Nacia Estraro ricevis tiun novaĵon kun granda kontento ĉar ĝi aldoniĝas al la streboj porti Esperanton kiel studobjekton al niaj universitatoj, kiel jam okazas en la Centra Universitato Marta Abreu de Las Villas (UCLV) kaj aliaj projektoj en Havano (Universitato de Pedagogiaj Sciencoj Enrique José Varona kaj en la Universitato de Artemisa.

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

Ĉeestantoj dum la inaŭguro de la Metiejo en Santiago de Cuba.

Foto: Yoel Hernández Echavarría.



Santa Clara. Forumo “Ludoviko Zamenhof: lia heredaĵo en la E-movado en Kubo”



Maldekstre, prelegas José Luis Montes de Oca Cárdenas, Prezidanto de la E-Grupo Santo Domingo. Dekstre, grupa foto de la partoprenintoj.
Fotoj: Raicel García Pérez kaj Dunieski Aguilera Barrera



La jaro 2017, estis proklamita de UNESCO kiel “Zamenhofa Jaro” por omaĝi al la iniciatinto de Esperanto en la 100-jariĝo de lia forpaso. Pro tio Kuba Esperanto Asocio aranĝis Laborplanon por tiu celo. Konsiderante tion, la esperantistoj de Villa Clara organizis kelkajn okazaĵojn, inter ili, la plej grava, Nacia Forumo “Ludoviko Zamenhof: lia heredaĵo en la Emovado en Kubo”.

La Forumo okazis de la 12-a ĝis la 14-a de majo 2017, kaj malgraŭ ne ĉeesto de reprezentantoj de kelkaj provincoj, kiuj aliĝis kaj promesis partopreni, sed fine ne povis alveni, la evento estis sukcesa.

La Forumo sesiis en la famkonata “Urba Domo”, kultura institucio de Santa Clara, kiu troviĝas en la urbocentro, ĉe la Bulvardo, kaj la distra aranĝo kiel resumo de la Forumo okazis en la samstrata Hotelo “Casa Centro”.

Entute alvenis 32 gesamideanoj de Cienfuegos, Mayabeque, La Habana kaj Villa Clara.

Dum la evento prezentiĝis 11 prelegoj kun debato de la partoprenintoj; oni ekspoziciis abundajn materialojn pri la vivo kaj verko de Zamenhof, kaj la esperantista pentristo el Placetos, Dunieski Aguilera Barrera sukcese kaptis la personecon de la kreinto de Esperanto.

Eddy Machado Hernández, Prezidanto de la E-Grupo Santa Clara bonvenigis la ĉeestantojn per malferma parolado kaj José Luis

Montes de Oca Cárdenas, Prezidanto de la E-Grupo Santo Domingo enkondukis la diskuttemon. Javier Ramos Nistal, en reprezento de la Nacia Estraro de KEA transprenis la oficialan fermon de la Forumo.

En la fino, la organizantoj zorgis pri disdono de memoraĵo al ĉiuj partoprenintoj, kiuj povis babilu kaj ĝui etan bufedon. Laŭ la taksoj, la celo de tiu bone organizita aranĝo estis plenumita.

EDDY MACHADO HERNÁNDEZ

JOSÉ LUIS MONTES DE OCA CÁRDENAS



Organización
de las Naciones Unidas
para la Educación,
la Ciencia y la Cultura

**100° aniversario de la muerte
de Ludwik Zamenhof**

Celebrado en asociación con la UNESCO

Aranĝoj en niaj filioj kaj grupoj okaze de la Zamenhof-Jaro



Supre: Havanaj geesperantistoj ĉe la memortabulo lokita en Lonja del Comercio. Foto: Olga Lidia Barrios Cunningham. Meze kaj malsupre: Partoprenantoj en la aranĝo okazinta en la Provinca Biblioteko de Cienfuegos. Foto: Denia López Fuentes.

Havano.

Komuna foto ĉe la Memortabulo

La 14-an de aprilo, ĝuste en la 100-a Datreveno de la forpaso de Ludoviko Zamenhof, kaj realigante unu el la aranĝoj planitaj en Kubo por omaĝi la kreinton de Esperanto, havanaj esperantistoj kunsidis apud la memortabulo kun bildo de la Majstro starigita ĉe la konstruaĵo Lonja del Comercio en Malnova Havano en 1990, cetere la unua ZEO en Kubo.

Estis feria tago, okaze de la katolika Sankta Semajno, sed esperantistoj estis alvokitaj ĉeesti tagmeze en la bele restaŭrita Placo de Sankta Francisko el Asizo en Malnova Havano (la komerca centro de la urbo dum la kolonia epoko), en ne nepre bona horo por eksteraj aranĝoj en Kubo pro la varmo, jam dum tiu monato, kiam ankoraŭ ne komenciĝis somero, kaj malgraŭ ĉio, alvenis preskaŭ dudeko da esperantistoj.

Oni organizis tie simplan, sed emociplenan aranĝon. Niurka Alonso Santos, prezidantino de la Provinca Filio de KEA en Havano bonvenigis la ĉeestantojn kaj Ismary Lezcano García, laŭ propono de Fernando Paredes Elósegui, per ĉarma voĉo legis la poemon “La Majstro mortis”, kiu estis verkita antaŭ cent jaroj de Julio Baghy. Roberto Nuñez Silva kaj Digna Morales Burón deklamis duvoĉe la poemon de Zamenhof “Preĝo sub la verda standardo”.

Dum la renkontiĝo ni klarigis al hazardaj kaj kuriozemaj preterpasantoj kion ni faris, kiu estis Ludoviko Zamenhof, kio estas Esperanto kaj kial ni kunvenas tie kaj tiam.

Post tiu formala sesio, ni fotis nin ĉe la memortabulo, ĵus purigita kaj briligita okaze de la datreveno.

NIURKA ALONSO SANTOS

Cienfuegos.

Aranĝo ĉe la Provinca Biblioteko

Esperantistoj en Cienfuegos kaj laboristoj de la Provinca Biblioteko kuniĝis por festi tre gravajn datojn.

La 14-a de aprilo estas tre grava dato por ni, ĉar okazas la 100-a Datreveno de la forpaso de Ludoviko Zamenhof, kreinto de Esperanto. La alia dato estas la 198-a Datreveno de la fondo de Cienfuegos, kiu okazis la 22-an de aprilo.

Denia López Fuentes (sekretarino de la E-Grupo), Neify (estriino de la Biblioteko) kaj Alina Zuaznabal Himely (prezidantino de la E-Grupo Cienfuegos) klarigis la celon de tiu renkontiĝeto: Festi la du plej gravajn datojn pri kiuj ni jam supre parolis, la alia celo estis montri “Kiel esperanto influas en la loka kulturo”.

Akompanis nin Eddy Machado Hernández (Komitatano de Santa Clara) kaj Dunieski Aguilera Barreras (el urbeto Placetos, Villa Clara). Kiel kutime, Ained Marín López kantis por ni, ĉi-foje, “Kun vi en la distanco” kaj “El Cienfuega Luno”.

En la programo ni prezentis du ekspoziciojn. La unua pri Esperanto kun multaj ekzempleroj de libroj kaj gazetoj (oni trovis biografion de Zamenhof, esperantigitajn verkojn de José Martí kaj aliajn materialojn) kaj la dua pri nia urbo Cienfuegos.

Ramona Consuegra González prelegis pri la Fondo de Cienfuegos en 1819, kaj aparte reliefigis la belan arkitekturon de la urbo, kio ebligis interŝanĝon pri nia rolo kiel esperantistoj kaj kulturagantoj.

Alina deklamis la poemon “La du princoj”, de nia nacia heroo, José Martí. Albania Duthil Álvarez (el Havano, iama estrarano de KEA), kiu surprizis ĉiujn per sia ĉeesto, parolis pri Zamenhof kaj ankaŭ legis du liajn poemojn. Alina kaj Eddy, komitatanoj de KEA, raportis pri la agado de nia Asocio dum 2017 kaj pri la 9-a TAKE okazonta en Havano februare de 2018, kaj atentigis pri la graveco plibonigi la uzon de la lingvo. La partoprenintoj dankis pro la renkontiĝo kaj je la fino oni regalis ĉiujn per eta bufedo.

ALINA ZUAZNABAL HIMELY

Granma.

Solenajo en la Sidejo

Okaze de la 14-a de aprilo la granmanoj honoris al Zamehof en la sidejo de la Provinca Filio de KEA en Bajamo. La aranĝo, kiun partoprenis 15 membroj de la klubo Martí-Zamenhof komenciĝis per kantado de la Nacia Himno ankaŭ konata kiel Himno de Bajamo.

Rafael Cabrera Espinosa, komisiito de la Nacia Komitato de KEA por la Orienta Regiono, estis intervjuita de la provinca televidkanalo pri la E-movado en Kubo kaj aparte en Granma, samkiel pri la Zamenhof-Jaro. La ĵurnalisto tre interesiĝis pri la lingvo kaj ĝia rolo en la nuna mondo.

D-ro Wilfredo Díaz Hernández, prezentis prelegon pri la vivo kaj signifo de Zamenhof por la homaro kun akcento pri ties prefero esti nomita iniciatinto kaj ne kreinto de Esperanto. Frank Cedeño Estrada, Carmen Dubel Lachatagnerais Popa kaj Anyer Montero Ramos ankaŭ kontribuis pri la vivo de Zamenhof. Dubel deklamis la poemon pri Martí, premiitan en la Konkurso de KEA, pri kiu ankaŭ interesiĝis la televido kaj poste Wilfredo deklamis poemon de Zamenhof. Post kantado de “La Espero” Frank ripetis la inviton al venonta renkontiĝo okaze de la datreveno de la naskiĝtago de Carlos Manuel de Céspedes la Patro de la Patrujo. ANYER MONTERO RAMOS



Guantánamo.

Esperanto en la komunumo

La pasintan 15-an de aprilo la E-Grupo Guantánamo vizitis la Oficejon por la Urba Disvolvo, kies estrino, arkitekto Zulma Ojeda Suárez, ricevis la “Premion Vivo kaj Verko” de la Kuba Unuiĝo de Arkitektoj kaj Konstruĝingeneroj (UNAIACC) pro la daŭra kaj sindediĉa laboro en la rekonstruado kaj restaŭrado de Guantánamo.

Nia E-Grupo decidis aliĝi al la omaĝoj de la urbo kaj venis al ŝia oficejo kun buketo kaj Zamenhof-bildkarto, kie okazis interesa interŝanĝo.

Dum nia interparolo ni aŭskultis pri ilia meritinda laboro kaj poste prezentis nian E-agadon kaj informis pri la nuna stato de Esperanto en Guantánamo, en Kubo kaj en la mondo.

Ni kaptis la okazon por rememori pri la iniciatinto de Esperanto kaj aparte pri Fidel, kiu dum la akcepto okaze de la 75-a UK (Havano, 1990) diris: “[...] han sido perseverantes en una tarea que es muy difícil [...]”.

RAÚL SÁNCHEZ GUILARTE



Supre: Rafael Cabrera Espinosa alparolas la ĉeestantojn en la sidejo de la Provinca Filio de KEA en Granma. Foto: Anyer Montero Ramos. Malsupre: La E-Grupo Guantánamo ĉe la Oficejo por la Urba Disvolvo en Guantánamo. Foto: Miguel Luis Vera Challenger.

Sciencpopularigaj temoj: Kreoliĝo de Esperanto (fino)

En antaŭa numero de nia bulteno ni ekparolis pri sciencpopularigaj temoj kiuj ja utilas al la esperantistoj en sia ĉiutaga vivo en Esperantujo kaj ĉefe ekster ĝi. Tial ni pritraktis eseon verkitan de d-ro Renato Corsetti kaj legebla en la libro *Por aktiva lingvopolitiko*, kiu enhavas la aktojn de lingva simpozio okazinta en Prago en 1996.

La libron eldonis UEA kaj tial ni ŝatus aparte plue pritakti la eseon verkitan de Corsetti pri Kreoliĝo de Esperanto inter personaj gustoj kaj oficiala normo.

Rezulte, d-ro Corsetti en sia verko komparas Esperanton kun la kreolaj kaj piĝinaj lingvoj. Tiucele li proponas analizi kelkajn lingvajn trajtojn de piĝinaj kaj kreolaj lingvoj. Li nomas tiun subĉapitron de sia verko “Esperanto: nek piĝina, kaj eble, nek kreola”.

Unu el la lastaj plej influaj lingvistoj-esperantistoj, d-ro István Szerdahelyi, plurajn fojojn komparis la strukturon de Esperanto kun tiu de franc-bazaj piĝinaj lingvoj.

Tamen, surbaze de la karakterizoj de piĝinaj lingvoj estas malfacile enkadrigi Esperanton en tiujn lingvojn, kaj estas malfacile kom-

pari la sekvojn de la akirado de Esperanto fare de denaskaj Esperanto-parolantoj kun la sekvoj de la akirado de piĝinaj lingvoj. Sed kio estas piĝina lingvo?

En la eseo de d-ro Corsetti eblas legi ke oni kutime enklasigas piĝinajn lingvojn en la klasojn: mar-ŝipa, komerca, interreto-kontaktata, laborista.

Do, Esperanto ne apartenas al iu ajn el tiuj klasoj. Ĝi ne ekestis pro praktikaj kontaktoj inter parolantoj de malsamaj lingvoj sed por kontaktoj inter tiaj homoj.

Do, ĝia ekesto ne okazis tiel dirite “nature”, sed intence, laŭplane, kio havis klarajn lingvajn sekvojn en la senco ke jam de la komenco Esperanto prezentiĝas minimume kiel, onidire, “plivastiĝinta piĝina lingvo”, en kiu ĉiuj necesaj gramatikaj funkcioj estas jam ĉeestaj, dum piĝinaj lingvoj, almenaŭ en la komenca fazo, prezentiĝas kiel nekompletaj komunikiloj, en kiuj la kunteksto helpas la komprenon, sed mankas la kutimaj lingvaj gramatikaj rimedoj.

Do, por daŭrigi legante tiun ĉi interesan verkon mi invitas vin serĉi la libron *Por aktiva lingvopolitiko*, kiu enhavas plurajn interesajn tiaspecajn artikolojn de tre prestiĝaj profesoroj el la Esperanto-komunumo.

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

esperanto CUBA

Aranĝoj omaĝe al la 38-a Datreveno de KEA

Daŭra kaj persista laboro en Granma

La 17-an de junio la granmanoj festis novan Datrevenon de KEA en la sidejo de la Filio kun partopreno de 25 asocioj. Matene la estraranoj kunsidis por aranĝi detalojn pri la festo kaj poste Frank Cedeno Estrada kaj Rafael Cabrera Espinosa ekkuiris tradician supegon en la korto de la sidejo.

Posttagmeze ekalvenis la ĉeestantoj kaj la aranĝo mem komenciĝis per prelego de Frank pri la historio de la E-movado en la provinco kaj en Kubo. Poste Cabrera parolis pri sia esperantistiĝo kaj pri la ekesto de la sidejo en la Kulturdomo antaŭ 14 jaroj.

Yoandris Pompa Valdespino estis la ĉefa preleganto, kiu akcentis la daŭran kaj persistan laboron de estraranoj kaj aktivuloj dum 38 jaroj en Kubo kaj en la provinco.

Dum aparta programero dediĉita al la patroj Carmen Dubel Lachatagnerais Popa deklamis poemon kaj Anyer Montero Ramos legis omaĝan tekston. José Conesa Fernández prelegis pri interreto kaj pri la stato de la filia retejo. En la fino, Cabrera informis pri la partopreno en la 9-a TAKE.

ANYER MONTERO RAMOS

Riĉenhava aranĝo en Santiago de Cuba

La 24an de junio 2017, la PF Santiago de Cuba festis la 38-an Datrevenon de KEA, kadre de la Zamenhofa Jaro, per riĉenhava aranĝo, okazinta kun ĉeesto de kvardeko da esperantistoj de tiu urbo kaj Contraestre, gastoj el ekstermovadaj institucioj, reprezentantoj de Guantánamo kaj la Nacia Estraro.

La solenaĵo komenciĝis per vizito al la Tombejo Santa Ifigenia kaj daŭrigis urbocentre ĉe institucio dediĉata al la loka familio Maceo-Grajales (Centro Maceista), kie unue Julio César Tamayo Salas prezentis la E-version de la "Koncepto de Revolucio", de Fidel Castro, laŭ traduko de Maritza Gutiérrez González.

La solenaĵo daŭrigis per la bonvena alparolo de Guillermo Navarro Toledano, prezidanto de la PF kaj per didaktika prelegdemonstrado gvidita de Juan Ramón Rodríguez Gómez (KEA-estrarano) pri la 38-a Datreveno de la Asocio, kio ebligis la aktivan partoprenon per respondoj de ĉiuj esperantistoj ĉeestantaj en la solenaĵo.

Inter aliaj eroj, okazis prezento de du malgrandaj videofilmoj: Vortoj de Fidel Castro al partoprenintoj en la 75-a UK (Havano, 1990); kaj filmeto de la grupo Amindaj, kiu gajnis premion de muziko en la konkurso Teo kaj Amo, organizita de Ĉina Radio Internacia.

Pluraj informoj pri la aktiva vivo de la esperantistaro en tiu ĉi teritorio ankaŭ havis spacon dum la duhora festo.

Gonzalo Collantes García (Ĝenerala Sekretario) informis ke, kiel parto de la aranĝoj por la Zamenhofa Jaro, komence de julio, en la municipa biblioteko Abel Santamaría, oni prezentos grafikan ekspozicion pri la kreinto de la lingvo, kiu restos tie dum tiu monato kaj tuj poste ĝi ekitineros tra diversaj provincoj (unue, Guantánamo, aŭguste).

Krome, oni informis ke, kadre de la menciita ekspozicio, la 29-an de julio, la filio festos la 130-an datrevenon de la momento kiam Zamenhof prezentis sian projekton de IL.

Tute neplanita ero estis la tre interesa parolado de Francés Guibert Sorzano, fondinto de la PF, kiu informis pri sia partopreno en



1. Yoandris Pompa Valdespino prelegas; 2. Anyer legis tekstojn omaĝe al la patroj. Fotoj: José Pacheco. / 3. Grupa foto de santiaganoj en la Tombejo Santa Ifigenia; 4. Partoprenantoj en la centra aranĝo en Santiago de Cuba. Fotoj: Luis Alonso Parra.

la lasta Internacia Kongreso de Fervojistoj (Francio, maje) kaj sia rondvojaĝo tra Eŭropo, kiu inkluzivis aliajn landojn, kiel Belgio, Germanio, Svedio kaj Svislando.

Granda parto de la fino estis okupita per prezentoj de la projekto Amindaj, je diversaj kombinoj: unuopaj kantoj de Jaime Ginate Díaz (el la duopo Fratoj El) kaj Miguel Ángel Sánchez Reyes, krome, ambaŭ duope kaj tiu ĉi lasta kun Adaelsi Castellanos Pérez, kiuj, entuziasmigis kaj eĉ dancigis la publikon.

Inter la gastoj, menciindas Laura Zúñiga, respondeculino pri asocioj ĉe la Provinca Direkcio de la Ministerio pri Kulturo en Santiago de Cuba; kaj Leonardo Luna Neyra, estrarano de la E-Grupo Guantánamo.

La aranĝo finiĝis per komuna kantado de "La Espero".

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ



Havano. Bataloj kaj defioj: 38 jaroj en movado senhalta

La 16-an de junio Kuba Esperanto-Asocio festis sian 38-an Datreveno kaj agotagon de Esperanto en Kubo en la Esperanto-Centro Havano kiel parto de tutlanda programo kiu inkluzivis informan agadon en diversaj amaskomunikiloj.

La programo estis speciale dediĉita al KEA-fondodatreveno, al la nacia heroo José Martí kaj al la tago de la patroj kaj patrinoj. Pedro Fernández Rodríguez prezentis la agadon de la Martí-klubo, kies laboro impulsas la literaturan agadon kaj proksimiĝon al la vivo kaj verko de Martí. Ankaŭ okazis tre vigla konkurso pri la historio de Esperanto en Kubo kaj lotumado.

La aranĝon partoprenis ĉirkaŭ 40 havanaj esperantistoj, kiuj deklamis, kantis, tostis kaj festis per torto kaj balo kiel tradicia esprimo de ĝojo kaj interrilato tipe kuba.

Sendube temis pri omaĝinda datreveno, interalie, pro la fakto ke la kuba esperantistaro sin preparas por novaj taskoj kaj defioj, kaj aparte por gastigi la 9-an Tut-Amerikan Kongreson komence de 2018.

Retroirante en la tempon, eblas konstati ke la nuna Kuba Esperanto-Asocio naskiĝis depost multa laboro kaj sindediĉo de niaj antaŭuloj; ili instruis la lingvon al ni, kaj ankaŭ transdonis al ni la torĉon de la esperantisma movado, iom da idealismo kaj inspiro.



Supre, prezento de la projekto Amindaj en Santiago de Cuba. Foto: Luis Alonso Parra. Malsupre: Grupa foto de la ĉeestantoj antaŭ torto por la 38-a Datreveno de KEA. Foto: Miguel Ángel González Alfonso.

Dum la lastaj 38 jaroj, KEA devis batali por supervivado kaj eltrovo de novaj manieroj allogi la homojn al sia sino. Estis tempoj malfacilaj kaj niaj homoj tra la tuta lando, spite al ĉio, sukcesis puŝi la movadon antaŭen. Gratulojn al la kuba esperantistaro!

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Kalendaro 2017

Julio-Aŭgusto

Somera programo de Provinca Filio Havano
Informoj ĉe: <niurka.alonso@etecsa.cu>

Oktobro

E-Aranĝo de Provinca Filio Granma
26-29 oktobro, Kampadejo Los Cantiles, Granma
Informoj ĉe: <esperanto@crisol.cult.cu>

Decembro

Zamenhofa Metiejo
14-17 decembro, Baracoa, Guantánamo
Informoj ĉe: <raul@elecgtm.une.cu>

9-a Tutamerika Kongreso de Esperanto



Havano, Kubo
11-17 februaro 2018

Lingvoj kaj kulturoj:
edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj

Aliĝu frue al la 9-a Tutamerika Kongreso de Esperanto!

La Librofoiro tra la lando

Santiago de Kubo

De la 12-a ĝis la 16-a de aprilo 2017 okazis en Santiago de Cuba la 26-a Internacia Librofoiro en la Kongresa Centro "Teatro Heredia" ĉi-foje dediĉita al Kanado kiel honora gastolando, al Armando Hart Dávalos, prezidanto de la Kultura Societo José Martí, same prezidanto de la Nacia Oficejo pri Martí-Studoj kaj aparte al la herdaĵo de Fidel Castro Ruz.

Kiel ĉiam, la Provinca Filio de KEA en Santiago de Kubo, partoprenis en la 26-a Internacia Librofoiro. Ni montris al la publiko pli ol kvindek ekzempleroj de E-literaturaĵoj.

La ĉefa celo de nia partopreno estis altiri la atenton de la vizitantoj, informi pri Esperanto, disdoni flugfoliojn kaj varbi por la kursoj. Deĵoris ĉe la du standoj Guillermo Navarro Toledano (prezidanto), Miosotis Planas Fajardo (kasistino), Gonzalo Collantes Garcia (ĝenerala sekretario) kaj Julio César Tamayo Salas (estrarano pri Instruado kaj Informado).

JULIO CÉSAR TAMAYO SALAS

Granma

La librofoiro en Bajamo okazis de la 6-a ĝis la 9-a de aprilo. La Provinca Filio de KEA en Granma, kiel jam tradicie, bone antaŭpreparis sin por tiu kultura evento, kiu ĉiujare altiras la atenton de la amasoj. Unika ŝanco por ankaŭ prezenti Esperanton. Nia stando prezentis varian ekspozicion de E-literaturaĵoj kaj gazetoj pri kiuj multaj preterpasantoj miris kaj kompreneble ankaŭ demandis. Dum kvar tagoj Ernestina, Reinaldo, Wilfredo, Erio, Raciél, Frank kaj Cabrera partoprenis kiel kunlaborantoj por ekspozicii kaj vendi librojn kaj aliajn varojn ĉe la pordego de la Kulturdomo "20-a de Oktobro" apud la murgazeto kiu daŭre staras tie por informi pri Esperanto kaj pri la aranĝoj de nia filio.

ANYER RAFAEL MONTERO RAMOS



Supre, Lázaro Expósito Canto, ĉe la stando de Esperanto en Santiago de Cuba. Foto: Julio César Tamayo Salas. Malsupre, la stando de la filio de KEA en Granma ĉe la enirejo de la Kulturdomo. Foto: Frank Cedeño Estrada.

Radioamatorismo en Kuba Esperanto-Asocio

Surbaze de la ideo por maksimuma uzo de la tempo kaj la spaco por disvastigi la internacian lingvon Esperanto kune kun la aplikado kaj praktiko de hobia, la 29-an de aprilo en la nacia sidejo de KEA, ni profitis la programeron "Movada foiro" kiu ebligas ĉiumonate prezenti fakgrupojn, klubojn kaj simile, kiuj aplikas Esperanton.

Kelkaj membroj de la Speciala Radioklubo de KEA insterŝanĝis ideojn kun Havanaj esperantistoj en agrabla etoso, kiu vekis interesigon al nia formo uzi Esperanton.

Ni parolis pri la rilato inter la lingvo kaj radioamatorismo kaj specife pri la kreado de nia Radioklubo CO9BN (voksigno de la Kluba radiostacio) kaj de KLERA (Kuba Laborgrupo de Esperantistaj Radioamatoroj).

Dum preskaŭ 5 jaroj tiu ĉi miksaĵo de Esperanto kaj radioamatorismo jam partoprenis kaj mem organizis multajn aranĝojn kaj ĉiutage plifortiĝas la kialo de ĝia kreado: Alporti la Internacian Lingvon al radioamatorismo, kaj tiel instigi kubajn radioamatorojn interesiĝi pri ĝia lernado cele al kunlaboro, aplikado kaj interŝanĝo.

Pluraj demandoj venis el la publiko... jen kelkaj:

Kiuj estas la celoj de la grupo?

Kion vi faras?

Kiel mi povas aparteni al la grupo?

Kiel mi povas fariĝi radioamatoro?

Kiujn aranĝojn vi jam faris?

Ĉu vi jam kontaktis eksterlandajn esperantistojn?

YORDÁN FONSECA OLIVERA (CM2YGO)



Kuba Esperanto-Asocio
info@esperanto.co.cu
www.esperanto.cult.cu





6-a Kuba Esperanto-Renkontiĝo
Kampadejo Río Seibabo
Manicaragua, Villa Clara
15-19 marto 2017



DATO			UNIVERSALA TEMPO UTC	MODO	FREKVENCO MHz	SIGNALRAPORTO		
T	M	J				R	S	T

Aranĝo organizita de la Speciala Radioklubo Esperanto omaĝe al kolego kaj samideano Francisco Rodríguez Lorenzo, ("Panchito", voksigno CO6RL) konata kaj elstara radioamatoro, kiu ankaŭ scipovis Esperanton, Honora Membro de la Kuba Federacio de Radioamatoroj (FRC), forpasinta en 2008.

CQ-8 NA-015 ITU-11



QSL-karto, kiun KLERA dissendis al radioamatoroj okaze de la radio-aranĝo dum la Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERo) 2017, en Río Seibabo, Manicaragua, Villa Clara.

Tra la spuroj de niaj klasikuloj

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ



Dulce María Loynaz, la plej granda el la kubaj verkistinoj en la 20-a jarcento, naskiĝis en Havano la 10-an de decembro 1902. Ŝi publikigis siajn unuajn poemojn en havanaj gazetoj je la aĝo 16-a. Fariĝis doktorino pri Juro en la Havana Universitato kaj ĝin praktikis dum okupiĝis, paralele, pri literaturo.

Iom post iom ŝi transformiĝis, subtile sed pasie, en unu el la ĉefaj figuroj ne nur de la kuba li-

riko, sed ankaŭ universala. Ŝi estis pli konata kiel poetino, sed ankaŭ multe verkis proze.

En 1986 ŝi gajnis la Nacian Premion de Literaturo, kaj poste, en 1991 gajnis la Premion de la Kritiko. En 1992 ŝi ricevis la Premion Cervantes, kaj enposteniĝis kiel direktorino de la Kuba Akademio de la Lingvo, kiun ŝi membris ekde 1959. Ŝi estis ankaŭ membro de la Reĝa Akademio de la Hispana Lingvo, akceptita en 1967.

En la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento, ŝia domo en Havano transformiĝis en centron de la kultura vivo de la urbo, kaj organizis nomatajn "ĵaŭdaĵojn", tio estis, ĵaŭdaj vesperoj kie ariĝis elstaraj intelektuloj kaj artistoj, interalie, Federico García Lorca, Juan Ramón Jiménez, Gabriela Mistral aŭ Alejo Carpentier.

Konsiderita kiel la plej alta reprezentantino de la postmodernista intimismo, ŝia lirika esprimo stampis per simpleco kaj efiko, esencajn temojn homajn, kaj ŝiaj versoj evidencigas majstran regon de universaleco kaj aŭtoktona trajto.

Ŝi ricevis multajn premiojn, omaĝojn kaj distingojn en diversaj mondopartoj. En la jaro 1992 en Kuracao, dum la tria kongreso de karibaj virinoj, ŝi estis elektita kiel la plej elstara poetino de la kariba regiono en la 20-a jarcento.

Dulce María Loynaz forpasis en Havano, la 27-an de aprilo 1997. Ŝia verkaro estis tradukita al pluraj lingvoj.

Dulce María Loynaz: la jubil' sekreta

Kaŝita akvo

Vi estas malluma akvo
Abunda interne de la roko
Vi estas malluma akvo, ankaŭ kara
Fluanta sube de la tero
ignorata de la suno,
de la soifo de la ter-spurantoj,
de tiuj tra la mond' vagantaj

Vi estas pura akvo sen destino kaj sen nom'
geografia; vi estas la netuŝita freŝo,
La trema freŝ-sekreto, la jubil' sekreta
De mia freŝo, kiu vi estas, de la profunda
Akvo kiu vi ĉiam estis,
Sen fariĝi pli ol tio iam;
Nigra akvo, sennoma...
Kaj premita, kontraŭ mi alpremita!



Tutamerika kongreso revenas al Kubo en 2018

Kuba Esperanto-Asocio sin preparas por organizi en Havano la 9-an Tutamerikan Kongreson de Esperanto de la 11-a ĝis la 17-a de februaro 2018, kies ĉeftemo estos "Lingvoj kaj Kulturoj: edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj".

TAKE estas kongreso kiu okazas ĉiun trian jaron, laŭ la iniciato de la Amerika Komisiono de UEA kreita en 1994 dum la 79-a Universala Kongreso en Seulo, sed la realaj kondiĉoj ne ĉiam tion permesis, tial jam pli

ol tri jaroj pasis de la 8-a TAKE en Brazilo 2011.

Havano levis la torĉon kaj entuziasme la kubaj esperantistoj laboras por sukcesigi nian regionan kongreson.

Ĝia ĉefa celo estas plivastigi la kunlaboron inter landaj movadoj de la Amerikoj kaj ankaŭ direkti la atenton al konservado kaj interesiĝo pri esperanto flanke de grupoj kaj izoluloj en landoj sen organizita strukturo aŭ malforta movado, kiuj bedaŭrinde pluras en nia mondoparto.

Estas planitaj prelegoj pri la kongresa temo kaj krome, interalie, okazos AMO-Seminario, fakaj kunsidoj, forumoj, spektakloj, ekskursoj tra la urbo, kaj antaŭ kaj postkongresaj ekskursoj.

Samtempe kun TAKE, okazos la jara renkontiĝo de la kubaj esperantistoj kaj Komitatkunsido. Ni esperas bonvenigi inter 100 kaj 150 partoprenantojn.

Ni invitas vin aktive partopreni kaj ĝui la 9-an Tutamerikan Kongreson!

La kunsidoj de la Komitato (I)

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

Delonge mi ŝuldas tiun ĉi tekston ĉefe por precizigi kaj klarigi plurajn aferojn rilate la okazigon de **la unuaj sep komitatkunsidoj**.

Kial ili bezonas precizigojn kaj klarigojn? Ĉar ili siatempe ne ĉiam estis ordigitaj kiel poste kaj rezulte de tio la Estraro eraris en 1991, kiam ĝi decidis ke la komitatkunsido koncernanta al tiu jaro estu la 8-a (vere devus esti la 7-a), eraro kiun oni konservis ĝis nun kaj jam ne eblas rearanĝi tion ĉar, ekde tiam, ĉiuj dokumentoj (eĉ la E-flago kiu historie registras la kunsidojn de la Komitato) sekvas en ordo tiun fiaskon.

Verdire, oni neniam rimarkis tion ĝis 2015, kiam mi komencis serioze tralegi, analizi kaj kompari la arkivitajn dokumentojn de tiu epoko, celante la kompilon de la dua volumo de *El Esperanto en Cuba*, kiun mi redaktas nuntempe; kaj, konsekvence, mi (kaj ni) bezonas konkludojn pri tio.

Antaŭ ol verki tiun ĉi tekston, mi dediĉis plurajn horojn kaj tagojn al serĉado de informoj pri tiuj jaroj, celante organizi konitaĵojn, precizigi detalojn kaj klarigi al mi mem kion, kiam kaj kie okazis tiuj kunsidoj, vere gravaj por la estonteco de KEA, en ĉiu momento de tiu periodo, kiu sendube estis la kerno de la sekvantaj etapoj, kaj kiam amase la esperantistoj ne nur funde lernis la lingvon, sed ankaŭ interesiĝis pri ĉiuj aferoj rilataj al ĝi kaj teame laboris por plifortigi la KEA-strukturon je ĉiuj niveloj.

Dum trarigardo de la dokumentaro pri la tutlandaj kunsidoj okazintaj de 1979 ĝis 1990 oni tuj konstatas, ke ne ekzistis normigita nomo por tiaj kunsidoj.

Do, aperas pluraj nomoj (ordigitaj aŭ ne) en la diversaj jaroj: **Plenkunsido, Komitata Asembleo, Asembleo de la Komitato, Nacia Asembleo de la Komitato, Nacia Komitato, Komitata Kunsido, Kunsido de la Komitato, Komitatkunsido...** kaj estas mia devo, kiel historiisto de la Asocio, difini kaj difinitivigi tion.

Mi opinias, ke la ununura valida maniero solvi la situacion – kaj subteni ĝin estontece – estas redifini la numerojn de la unuaj sep komitatkunsidoj – kiuj ankaŭ ne estas ĝuste precizigitaj ĉar tiam, kiel jam dirite, oni ne ĉiam ordigis ilin – kaj, ekde tiu de 1991 ĝis nun, konservi la sinsekvan numeron de la venontaj komitatkunsidoj.

Rezulte de tiu longa kaj intensa konsultado de la tiutempaj informoj, mi venis al la jenaj konkludoj pri la unuaj sep kunsidoj de la Komitato:

1. En 1981 (8-a kaj 9-a de aŭgusto) kaj 1982 (17-a de julio), en la Nacia Kapitulo (Havano), oni okazigis la 1-an kaj 2-an Plenkunsidojn de KEA kun amasa ĉeesto de esperantistoj el la tuta lando. Ambaŭ renkontiĝoj sesiis sub la gvido de la unua prezidanto de la Asocio, Andrés Rodríguez González. En la unua, oni elektis du Honorajn Membrojn: Pedro Pablo Lamas Díaz (Ciego de Ávila) kaj Raúl Juárez Sedeño (Camagüey). Sendube, tiuj plenkunsidoj estis gravaj okazintaĵoj por la interna vivo kaj plifortigo de KEA, sed tie ne okazis kunsidoj de la Komitato kaj, pro tio, oni ne devas konsideri ilin kiel parto de la historio de tiu instanco.
2. La Komitato, laŭ difino de la Statuto de 1979, kunsidas unufoje de la 19-a ĝis la 20-a de novembro 1983 (ankaŭ en la Nacia Kapitulo kaj sub la gvido de Rodríguez González) dum la tiam nomita **1-a Nacia Asembleo de la Komitato** (do, la **1-a Komitatkunsido**), kiam oni elektis nian trian Honoran Membron (proponitan de Juárez Sedeño): Ricardo Salazar Crespo, (Casco-

rro, Camagüey). Aldonendas ke tiu ĉi jaro havas tre gravan signifon en nia historio, ĉefe pro tri okazintaĵoj: la 3-an de januaro, KEA malfermas sian unuan oficialan sidejon (ĉe la adreso Neptuno kaj Industria, Centra Havano); en aŭgusto, unufoje post la refondo en 1979, la Asocio reprezentiga en Universala Kongreso (83-a UK, Budapeŝto, Hungario), pere de sia prezidanto; kaj, dum tiu UK, KEA aliĝas al UEA.

3. De la 8-a ĝis la 9-a de decembro 1984 (ankaŭ en la Nacia Kapitulo kaj sub gvido de Rodríguez González) sesias alinomita evento: la **Nacia Komitato**, kiu vere estis la **2-a Komitatkunsido**.
4. De la 13-a ĝis la 15-a de decembro 1985 (samloke kaj sub la gvido de nia unua prezidanto) okazas la **2-a Asembleo de la Komitato**, kiu por ni devas esti la **3-a Komitatkunsido**. Dum tiu ĉi renkontiĝo, Andrés Rodríguez González estas reelektita prezidanto de KEA.
5. La 15-an de januaro 1986, la Nacia Estraro de KEA, post funda analizo de pluraj problemoj en rilato kun Rodríguez González, decidis ŝanĝi la prezidantecon al Andrés Piñera Prieto (la dua KEA-prezidanto), kiu okupiĝis pri tio ĝis la 14-a de junio 1986, kiam okazas la **Eksterordinara Gvido de la Nacia Komitato**, kiu sesias en la sama loko, sub la gvido de Piñera Prieto, kiu en tiu tago estas anstataŭita de Jesús Castillo Jiménez (tria prezidanto de KEA), kiel rezulto de kontorevizorado al la Asocio. Kvankam la menciita kunsido estis eksterordinara, ĝia vera graveco por la estonteco de KEA, la izoliteco de tiutipaj kunsidoj (la ununura dum pli ol 30 jaroj), kaj la sinsekvo de la postaj kunsidoj ĝis 1991, estas sufiĉaj kialoj por nombri ĝin la **4-a Komitatkunsido**.
6. La 6-an kaj 7-an de decembro 1986, en la sportlernejo Manuel Fajardo, en Santa Clara (unufoje ekster Havano), gvidata de Castillo Jiménez, sesias la **3-a Asembleo de la Komitato**, kiu por nia historio devas esti konsiderata la **5-a Komitatkunsido**.
7. La 3-an de decembro 1987, ĝuste antaŭ la okazigo de la 1-a Kongreso de KEA (4-a ĝis 6-a de decembro), en salono de la Latinamerika Stadiono (Havano), gvidita de Castillo Jiménez, oni aranĝas **Kunsidon de la Komitato**, kiu, rezulte de tiuj ĉi analizoj, estas la **6-a Komitatkunsido**.
8. En 1988 kaj 1990 ne okazas kunsidoj de la Komitato, pro la fakto ke la tiama Estraro intense laboris por la okazigo, respektive, de la Iberamerika Konferenco Esperanto '88 kaj la 75-a Universala Kongreso, ambaŭ okazintaj en la Kongresa Palaco, en Havano.
9. Dum la 18-a kaj 19-a de januaro 1989, KEA organizas la unuan renkontiĝon rekte nomitan **Komitatkunsido** (dufoje ekster Havano) en hotelo Plaza (Camagüey), sub la gvido de Julián Hernández Angulo, tiam vicprezidanto, kiu dum tiu kunsido anstataŭis la prezidanton Castillo Jiménez. Laŭ la sekvata ordigo, tiu renkontiĝo devas esti konsiderata la **7-a Komitatkunsido**.

La sekvantaj kunsidoj de la Komitato havas siajn respektivajn numerojn, laŭregistre sur la koncerna flago.

Pri ili, mi verkos en la dua parto de tiu ĉi artikolo, publikigota en venonta eldono de *esperanto.cu*.



Esperanto en la Tago de la Laboristoj

La 1-an de majo 2017 okazis granda parado en Havano pro la Tago de la Laboristoj. Ĉi-jare grupo de esperantistoj ankaŭ partoprenis kaj reprezentis Esperanton. Post multaj klopodoj flanke de Oscar Asensio Pisciotta, partopreno de esperantistoj en publikaj amasiĝoj okazis.

Oni devas rekonii lian persiston pri la afero, kio ja estis entreprenita ekde la pasinta jaro dum la parado en la Placo de la Revolucio pro la forpaso de Fidel. Tiam li kaj kelkaj esperantistoj kiuj hazarde ĉeestis la paradon renkontis lin ĉar li portis esperantan flagon tre alte ĉe masto.

Lia ideo enradikiĝis kaj post kelkaj mesaĝoj kaj kunordigo deko da esperantistoj partoprenis la aranĝon. Tre interesa okazintaĵo estis la ĉeesto de la vicministro pri kulturo Fernando Rojas kiu rekte prizorgas la rilatojn de la Ministerio pri Kulturo kun nia Asocio, li fotis sin kun la grupo kaj dankis pro nia aktivado en la komunumo.

La celoj de la aranĝo esti plenumitaj, vidigi Esperanton al la publiko, montri ke esperantistoj ankaŭ aktivis en la socia vivo de nia lando, vekti atenton de niaj aŭtoritatuloj, kiuj rimarkis ke esperantistoj ankaŭ agas, aktivis kaj estas parto de nia socio.

Informado dum la aranĝo okazis kaj ĝi fakte estis tre bone organizita flanke de Oscar kiu desegnis kaj printis centojn da informkartoj pri Esperanto kaj KEA plus ligiloj al E-informoj ĉe ECURED. Oni eĉ sukcesis vidi la Esperantan flagon dufoje en la nacia televido. Grandaj banderoloj estis desegnitaj kaj pentritaj de Oscar kaj portitaj de la ĉeestantoj dum la tuta marŝo tra la placo.

La ideo estis bonega kaj pro tio li ricevis laŭdon de la Nacia Estraro de KEA dum aranĝo en la Nacia Sidejo. La etoso estis tre pozitiva kaj agrabla, regis entuziasmo inter la partoprenantoj kiuj certe troviĝos inter la ĉeestantoj dum venontaj tiaj aranĝoj.

JAVIER RAMOS NISTAL



Karibia kultura diverseco en la Domo de la Amerikoj



Delonge KEA interesiĝas pri ĉio en rilato kun la ebleco etendigi Esperanton tra la karibia regiono. Celante tion, de 2001 ĝis 2008, mi partoprenis en la Karibia Kultura Festivalo (Santiago de Cuba), ĉefe en la kolokvo «El Caribe que nos une» (La Karibio kiu unuigas nin), kie mi plurfoje prelegis kaj interŝanĝis opiniojn kun pluraj el la ĉeestintaj fakuloj.

Kiel parto de tiu ideo, KEA ekkomencis la prezentadon de standoj pri la lingvo en internaciaj librofoiroj en landoj de nia regiono, ĉefe kun la celo propagandi la aferon; ĉi-direkte, nia asocio (pere de Alberto Rodriguez Pineda kaj mi) partoprenis la Librofoiron de Sankta Domingo (Dominika Respubliko), en 2002 kaj 2003, kaj ambaŭ samjare en la Librofoiro en Guadalajara (Meksiko). Rezulte de tio, ni sukcesis organizi interŝanĝojn kun interesitoj ambaŭloke kaj kun oficialaj reprezentantoj de pluraj aliaj landoj.

En la du lastaj jaroj, KEA reprenis tiun ideon kaj pro tio Pedro Fernández Rodríguez ĉeestis la Internacian Librofoiron de Sankta

Domingo en 2016 kaj mi partoprenis en la 6-a Internacia Kolokvo pri la Karibia Kultura Diverseco «Memoria y conflictos de frontera», okazinta en la Domo de la Amerikoj, en Havano, de la 22-a ĝis la 26-a de majo ĉi-jare. La debatoj traktis tri ĉefajn temojn, nome: la centjarigoj de la transiro de Virgulininsuloj el Danio al Usono, de la oficialigo de la usona civitaneco al portorikanoj, kaj la 80-a datreveno de la amasbuĉado de haitianoj en la landlimo Haitio-Dominika Respubliko.

Por ĉiuj interesitoj pri karibiaj temoj kaj pri la savo de la materia kaj nemateria heredaĵo de la regiono, la evento ebligis novan oportunon de renkontiĝo por fakuloj el diversaj landoj kaj admirindan spacon por la dialogo kaj la interŝanĝo.

Tiu ĉi kolokvo estis ankaŭ parto de la agadoj dum 2017 de la Unesko-Katedro por la Interkultura Dialogo en Nia Ameriko.

La kolokvo permesis al nia asocio interŝanĝi kun fakuloj el diversaj landoj de nia regiono kio demonstras la gravecon partopreni eksterasociajn eventojn, ĉefe kulturklerigajn, kie ni povas prezenti Esperanton al aliaj publikoj kaj kie, plurfoje aperas interesitoj lerni la lingvon kaj etendigi ĝin en aliaj medioj.

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

INFORMILO n-ro 2 DE LA CENTRA OFICEJO (ĝis 2017-06-30, CUP)**MEMBROJ-SUBTENANTOJ 2017 (62)**

★ **La Habana (30):** Alberto Fernández-Calienes Barrios; Alberto Rodríguez Pineda; Alejandro García Acosta; Ángela María Pedrosa Cuesta; Ariadna García Gutiérrez; Charlie Joan Obregón Cepero; Daimi Doval Delsa; Digna Mayra Morales Burón; Geomar Martínez Pérez; José Evelio Cárdenas Zúñiga; José Luis Hernández Carvajal; Juan Carlos Montero Medina; Juan Ramón Rodríguez Gómez; Julián Hernández Angulo; Luis Enrique Rizo García; Luis Enrique Sotolongo Gilchrist; Magaly Valdés Serrú; María Antonia Cartaya Martínez; Maritza Gutiérrez González; Marta Eugenia Alonso Gutiérrez; Mayra Núñez Hernández; Miguel Ángel González Alfonso; Olga Lidia Barrios Cunningham; Oscar Asensio Pisciotta; Pedro Fernández Rodríguez; Teresa Cepero

Tejeda; Vilhelmo Lutermano; Yordán Fonseca Olivera; Noel González Fernández; Ismary Lezcano García. ★ **Mayabeque (1):** Yunió Benítez Alonso. ★ **Villa Clara (8):** Dunieski Aguilera Barrera; Eddy Machado Hernández; Ena González Machado; Manuel Antonio Fuentes Gary; Nadia Peeva Miteva; Noelys Caridad González Hernández; Roberto Molina Gálvez; Yusimith Barrera Camacho. ★ **Cienfuegos (1):** Alina Zuaznabal Himely. ★ **Santi Spiritus (1):** Yoandra Rodríguez Labrada. ★ **Ciego de Ávila (1):** Amparado Cisnero Rovira. ★ **Camagüey (1):** Jorge Luis González Santillán. ★ **Las Tunas (2):** Anida Santiesteban Garcés; Juan Miguel Leyva Carralero. ★ **Santiago de Cuba (8):** Pablo Cabrera Toledano; Guillermo Navarro Toledano; Osiri de la C. Salas Madrazo; Jaime Ginarte Díaz; Graciela Morgado Rodríguez; Manuel Mu-

ñoz Laffita; Francés Guibert Sorzano; Julio César Tamayo Salas. ★ **Guantánamo (9):** Asiel Torres Laurencio; Iliagne Torres Jardines; Julia Lescaille Fernández; Leonardo Luna Neyra; María Lisandra González Hurtado; Miguel Luis Vera Challinger; Roberto Claro Guerrero; Tania Laurencio Molina; Tirso Ávila Bory.

DONACIOJ (3 243.00) ★ Martí-Klubo (1 420.00): Olga Lidia Barrios Cunningham (100.00); María Antonia Cartaya Martínez (50.00); Pedro Fernández Rodríguez (200.00); Vilhelmo Lutermano (1 000.00); Angela Pedrosa Cuesta (70.00); Maritza Gutiérrez González (72.00). ★ **Fonduso Instruado (2 159.00):** Pedro Fernández Rodríguez (200.00); Lotumado dum KERo 2017 (215.00); Aŭkcio dum KERo 2017 (250.00); Vilhelmo Lutermano (1 088.00).

Al ĉiuj donacintoj KEA tre kore dankas.

Vi certe jam pagis vian kotizon por 2017, aŭ eble vi jam eĉ varbis novan asocianon.

Kuba Esperanto-Asocio
Apartado 5120, 10500 La Habana, Cuba
+53 7 640 4484
info@esperanto.cu
www.esperanto.cu/cult/cu

**9-a Tutamerika Kongreso de Esperanto**

Havano, Kubo
11-17 februaro 2018

*Lingvoj kaj kulturoj:
edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj*

**Amika voĉo el Kubo,
Libera
Teritorio en
Ameriko**

www.radiohc.cu/eo

RADIO HAVANO KUBO

Kurtondaj kaj retaj elsendoj en Esperanto

Nun ankaŭ en FM!

